

ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-REVUO

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO
DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO
ESPERANTISTA

XIV. JARKOLEKTO 1932.

RESPONDA REDAKTORO: RUD. HROMADA (PRAHA)
REDAKTOROJ: H. K. BOUŠKA (PRAHA), O. GINZ (PRAHA), Dr. STAN. KAMARYT
(BRATISLAVA)

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO:
PRAHA VII.
SOCHAŘSKÁ 333

PRESIS JAN MINÁŘ NYMBURK

TABELO DE ENHAVO

LITERATURO

Signo * montras poemon.

Originala :

Julio Baghy: *Al venko	19
*Post striko	19
Dr. K. Kalocsay: *Korojn supren	4

Tradukita :

Karel Čapek: Sur la sojlo de la misteroj. (Trad. R. H.)	3
Kiu estas pli gaja. (Trad. Rud. Fridrich)	103
Helena Čapkova: La ĉeriza miraklo. (Trad. L. Krysta)	63
Jarmila Hašková: Notoj de profesoro. (Trad. M. Z.)	20
Jen la homo. (Trad. Fr. Kruták)	81
Janko Jesenský: Lizo. (Trad. P. Rosa)	78
J. S. Machar: *Romanco pri mia amiko. (Trad. M. Lukáš)	3
*Funebra vestaĵo. (Trad. M. Lukáš)	102
Jan Neruda: La unua majo. (Trad. Oldřich Štěch)	39
Li estis sentaŭgulo. (Trad. B. Hofmanová)	50
Jan Vrba: La malgaja korniko. (Trad. M. Ginzová)	104

POPULARSCIENCAJ TEKSTOJ

Dr. Jan Kořínek: Estontaj natursciencaj inventaĵoj. (Trad. Dr. S. Kamaryt)	17
H. I.: Senarmigo kaj eduko	65
m. kv.: Komunaj nomoj el la personaj	97
Fermentita pano (J. Rebiček) 6. — Ĉu vi scias tion? (F. Pytloun) 6. — Angla kristnaska kanto verkita laŭ ĉeĥa legendo (J. Rebiček) 22. — Kiel ni instruas en la j. 1931—32, 22. — Shakespeare kaj la bohema maro (km) 41. — Babelaj turoj en Afriko 66.	

ESPERANTISTA MOVADO

Tutmonda :

Vuk Echter: Esperanto kaj blinduloj	84, 108
Pacifismo	108
Otto Ginz: Zamenhof — kaj Esperanto-stratoj	94
Dr. Stan. Kamaryt: Eĥoj de la ĝeneva lingvistika kongreso ĉe ĉeĥoslovakaj filologoj	1
Fr. Staněk: Idealismo, sed reala	101
A. Tarantíková: Miaj impresoj de la kongreso en Parizo	82, 104
Kongreso en Paris	9, 22, 34, 41, 53, 66, 89
Konferenco de IFETT en Praha 92. — Esperanto en la Intern kongreso por seksa reformo en Brno 92. — Rozo Esperanto 6, 67. — Dana registaro dankas a ĉsl. esperantistoj 13.	
EL ESPERANTO-MONDO	9, 22, 41, 53, 66

Ĉeĥoslovaka :

Pri Ĉ. A. E. : Bultenoj: 42—48	11-16, 25-35, 43-47, 57-60, 69-76, 89-94, 112-116
V. a. ĉsl. kongreso en Olomouc	11, 12, 13, 33, 37, 41, 57, 61, 69, 87, 89
13. ĝenerala kunveno	25, 34, 43
Komitataj kunvenoj	12, 33, 45, 57, 89, 112
Agado de ĈAE en 1931	25—31
Financa raporto de ĈAE pri 1931	31
Gvidantaro de ĈAE en 1932	46

Pri G. E. L.	54
Mezinárodní jazyk ve službách studentstva. (Rud. Fridrich)	36
Neznalost cizích jazyků (Rud. Fridrich)	77
Několik slov k vyuč. metodě esperanta (Julie Šupichová)	4
O Basic English (Dr. Č. Parma)	99
Státní zkoušky z esperanta (Dr. Aug. Pitlík)	16, 47, 59
Jazykový odbor Svazu čsl. esp.	76
Slavní mužové českoslovenští a esperanto (Dr. St. Kamaryt)	49
Nová a přece již stará myšlenka (--i--)	86
Movado en Ĉeĥoslovakio (diversaj kunlaborantoj)	13, 32, 59, 75, 91, 114
Ĉeĥoslovaka gazetaro kaj esperanto (O. Ginz)	15, 16, 34, 46, 60, 93, 113
Junulara komisiono	93
Skoltoj	92, 93
Pri la libroj	42, 88
Redakcia	10, 24, 42, 56, 68, 88, 109
Naše soutěž	56

LINGVA FAKO:

Hromada Rudolf: Texty a jich překlady s poznámkami	7, 23, 55, 67, 95, 110
Něco pro samouky a kursy	8
Frazeologio	96, 111
Slovesa přímo odvozená ze jmen podstatných	23
Já, přece	24
Sice, ovšem, arci	7
Řádek František: Chyby při překládání	95
Por kursanoj	6, 7, 22, 41, 53, 66, 108

la PROGRESO



OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.-- ; fremdlando Kĉ 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto : Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Sparkaso Praha : N-ro 34.271.

EHOJ DE LA GENEVA LINGVISTIKA KONGRESO ĈE ĈEĤOSLOVAKAJ FILOLOGOJ.

Niaj legantoj scias, ke la II-a internacia lingvistika kongreso en Genevo 25. VIII. — 29. VIII. 1931 diskutis detale pri artefarita helpa lingvo internacia kaj decidis daŭre studi tiun problemon. Estas interese legi, kion pri tiu demando diras la ĉeĥoslovakaj lingvistoj. Tial ni publikigas koncernajn partojn el raportoj, kiujn publikigis Dr. Vilém Mathesius, profesoro de la german-saksa filologio ĉe la Karlo-universitato en Praha kaj Dr. Václav Vážný, docento pri ĉeĥoslovaka lingvo-esploro ĉe Komenský-universitato en Bratislava.

„La plej grava parto de la kongreso estis kompreneble la plenkunvenoj. Bazo de traktado en ili estis respondoj venintaj al la kongresa sekretario pri tri demandoj. La unua el ili estis: Ĉu vi havas iajn praktikajn proponojn koncerne organizon de la lingvistika laboro, ĝia tekniko kaj ilaro? Dua demando tekstis: Kian taskon havas laŭ via opinio en estiĝo kaj evoluo de lingvoj (precipe en konstruado de lingvoj literaturaj) unuflanke fenomenoj spontaneaj kaj subkonsciaj kaj duaflanke enmikso de la volo kaj rezonado? Tiu ĉi demando estis akompanata ankoraŭ de demando kroma: Kion vi pensas pri enkonduko de artefarita lingvo kiel lingvo helpa? Tria demando estis: Sistemoj fonologiaj en si mem kaj en ilia

rilato al ĝenerala strukturo de la lingvo. Respondoj alvenintaj estis same kiel en Hago presitaj antaŭ la kongreso en libreto „Propositions“. Nova kompare al Hago estis, ke oni elektis por ĉiu demando raportanton, kiu en sia raporto pritraktis la plej gravajn el la venintaj respondoj kaj liveris tiel tre konkretan materialon por diskuto. Raportanto pri la unua demando estis prof. Debrunner el Jena, pri la dua prof. Jespersen el Köbenhavn, por la tria prof. Trubeckoj el Wien. La elekto de raportantoj estis tre feliĉa kaj multon helpis al pleneco de la diskutoj.

Debato pri la dua demando estis laŭ propono de prof. Meillet dividita je du partoj, parto pri la demando ĉefa kaj parto pri la kroma. Debato pri la ĉefa demando finis senfrukte. Tio estis parte pro tio, ke la psikologia termino subkonscio forkondukis la debaton sur falsajn relojn, ĉar la parolantoj komencis disputi, kio estas subkonscio, parte pro tio, ke la kongresanoj plej multe ne estis ĝis nun atentintaj la problemon de internaciaj influoj de la lingvo, kvankam ĝi estas fundamenta problemoj de la lingva kulturo kaj praktikaj adaptiĝadoj de la lingvo ĝenerale. Kontraŭe la demando kroma vekis viglan debaton. La raportanto, profesoro Jespersen mem, donis al ĝi rimarkindan gravecon kaj kongresanoj estis pri ĝi aten-

tigitaj antaŭe per presaĵoj, kiujn ili estis ricevintaj precipe de la Societo por internacia helpa lingvo (International Auxiliary Language Association). Tiu ĉi societo, por kiu iĝis en kongreso kutima la mallongigo IALA, estis fondita pro iniciato de Internacia esplorista konsilantaro 1925 en Usono, kaj ĝia tasko ne estas propagando por iu el ekzistantaj artefaritaj lingvoj, sed scienca studo por kreo de tia lingvo, kiu estus plenumanta postulojn de ĝi necesajn. Tial oni kreis en tiu societo sekciojn: por studo de problemoj pedagogiaj, lingvistikaj kaj sociologiaj. Tasko de la sekcio lingvistika estas triopa: Ĝi devas unue esplori esencon de la lingvo kiel ilo komunika, ĝi devas per komparo de la ĉefaj mondlingvoj kaj de lingvoj artefaritaj enpenetri en detalojn de la lingva strukturo kaj fine kiel sintezon de ambaŭ esploroj prepari planon por definitiva internacia helpa lingvo. La unuaj du taskoj havas rimarkindan gravecon por ĝenerala lingvistiko sen atento pri problemo de helpa lingvo kaj per sia tendencaro ili kontaktas kun la doktrinara funkcie struktura. La afero iĝas ankoraŭ pli signifa, se ni pripensas, ke prilaboron de la unua tasko prenis lingvistoj tiom seriozaj kaj ŝatataj kiel profesoro Sapir foririnta ĵus el la universitato Chicaga en universitaton Yalesan, kaj profesoro Collinson el universitato Liverpola. La ĝeneva debato pri artefarita helpa lingvo estis preparita de konferenco, kiun kunvokis IALA finon de marto kaj komencon de aprilo 1931 al Genevo kaj kiun partoprenis krom prof. Jespersen kaj Collinson el lingvistikanoj ankoraŭ prof. Debrunner, komparatisto prof. Herman el Göttingen kaj anglisto prof. Funke el Bern. Jam en tiu ĉi konferenco kaj poste ankaŭ en la kongresa debato estis konstatite, ke rilato de lingvistoj al problemo de artefarita lingvo ŝanĝiĝis multe de post la tempo, kiam Brugman kaj Leskien aperis kun la opinio decide malaproba. Konkretan esprimon ricevis tiu ĉi vidmaniero per tio, ke la Geneva kongreso decidis, ke la Konstanta komitato (de la lingvistikaj kongresoj) ekriktu oficiale kun IALA. Ĝi estis jam la dua tiaspeca decido, ĉar jam dum debato pri proponoj

Debrunneraj la kongreso decidis, ke la Konstanta komitato oficiale ekriktu kun Internationale Gesellschaft für experimentelle Phonetik der Scriptur. La ŝanĝon de lingvistika opinio pri problemo de artefarita lingvo mi klarigas al mi ne sole per persona influo de profesoro Jespersen, kiu dediĉas sin al la afero kun granda fervoro, kaj per bona impresoj, kiun efikas science seriozaj klopodoj de IALA, sed precipe ankaŭ per transformiĝantaj konceptoj de la lingvo. Vidmaniero strukture funkcia ne estas persona plaĉo de kelkaj lingvistoj, sed efektiva tendenco de la hodiaŭa grado de la lingvistika pensado kaj ĝi vidiĝos sin en estonteco ĉiam pli intense. Mi estas certa, ke apud problemo de artefarita helpa lingvo akiros en iu venonta lingvistika kongreso sisteman atenton problemoj de la lingva kulturo. En la debatoj tiujaraj oni ja fuŝis jam ekzemple anstataŭadon de fremdaj vortoj per la hejmaj". (V. Mathesius en organo de Scienca societo Šafařík, Bratislava, V. jarkolekto, paĝo 739).

„En la dua plena kunveno oni traktis pri la tasko de fenomenoj spontaneaj, kaj subkonsciaj kaj konsciaj enpenetroj de la volo en evoluon de la lingvoj; en rilato kun tio estis solvata ankaŭ la problemo de internacia artefarita helpa lingvo. Raportanto pri tiu ĉi temo, eminenta pensulo pri problemoj lingvistikaj, Otto Jespersen, profesoro ĉe la universitato de Köbenhavn, atentigas pri la artefaritaj elementoj en ĉiuj lingvoj nomataj naturaj. Tiel estas artefaritaj ekz. nomoj de novaj inventaĵoj, novaj fabrikaĵoj en industrio kaj komerco k. s., en diversaj lingvoj influas registaroj kaj sciencaj aŭtoritatoj ne sole la ortografion, sed ankaŭ la gramatikon de la literatura lingvo. La miriga disvastiĝo de transportiloj kaj pliintensiĝo de kontaktoj inter homoj de la plej diversaj lingvaj medioj iĝas problemon de unu internacia helpa lingvo ĉiam pli urĝa. Lingvistoj ne povas jam hodiaŭ ne atenti la problemon de la helpa lingvo internacia. Ellaboro de tia lingvo internacia liveras al lingvisto multajn interesajn problemojn, kies solvado enportos novan lumon ankaŭ en psikologion de lingvoj ĝenerale. Dis-

kuto tre vigla montris, ke la hodiaŭa filologio — kontraŭ doktrinaro detempo pasinta — volas kaj povas valore helpi al solvado de tiu ĉi praktika lingvistika problemo. Oni decidis ekligi kontakton kun „International Auxiliary Language Association“ kaj kune labori por efektiviĝo de tiu ĉi ideo“. (V. Vážný en Slovenské Pohl'ady, jk. 48, p. 57.

Kvankam nia pli ampleksa sperto pri artefaritaj lingvoj igas nin defendantoj de parte alia teorio, ni ĝojas povu enpresu tiuj ĉi opiniojn de filologiaj altgradaj fakuloj. Ĉar oni vidas el ili nekontesteble, kiom urĝa estas la problemo, kiun nia movado daŭre solvas laŭ empiriaj metodoj. Stan. Kamaryt.

J. S. MACHAR:

ROMANCO PRI MIA AMIKO

Dum sangon li bolantan havis
Kaj plenan de juneca ard',
Amikon mian pleje ravis
Knabinaj rido, voĉ', rigard'.

Lin — kiel ĉiam la amantojn —
Allogis ankaŭ poezi',
Per ĉastaj versoj foliantojn
Fervore do plenskribis li.

Koncerne liajn belulinojn
La strofoj estis sen efik',
Iliajn volon kaj inklinojn
Ne ekkomprenis la amik' . . .

Jam ĉion rabis kaj frakasis
La tempo en rapida kur',
Juneco kun sopiroj pasis —
La foliantoj restis nur!

Kaj se vi lasas vin inviti
De li nun al cigar' kaj te',
Komencas nepre li reciti
Al vi la versojn . . . ve, ho ve!

La te' bonega — sed konstante
La raŭka voĉ' — deklam' sen fin' —
Kaj li, kritikon postulante,
Ekdormi eĉ ne lasas vin . . .

Cetere lin estimas ja mi;
Sed kial nur la kamarad',
Ne havis emon pli por ami
Kaj malpli por la versfarad'?!
El la ĉeĥa tradukis Miloš Lukáš.

Karel Capek:

SUR LA SOJLO DE LA MISTEROJ.

Ekzistas homoj kredantaj je nenio, eĉ ne je tio, ke pulo sur mano signifas leteron; sed eĉ tiuj ĉi plej obstinaj nekreduloj kredas je la Sorto.

Newton ja malkovris, ke ĉiu objekto falas perpendikle al la tero, sed tio ne estas vera; ekzemple, ĉiu scias, ke la koluma butoneto neniam falas perpendikle al la tero, sed iel oblikve, tiel, ke ĝi ĉiam troviĝas sub la lito aŭ sub la komodo. Neniu fiziko, nek gravitata teorio ĝis nun klarigis tiun ĉi fatalan aperaĵon; ĝi estas fenomeno sendispute metafizika, simpla kaj mistera leĝo de la sorto.

Ekzistas multego da tiaj leĝoj. Kiel ekzemplon mi citas, per milfoja konstataado konfirmitan, leĝon de spiteco. Tio, kion vi ne bezonas, ĉiam montriĝas antaŭ viaj okuloj; tuj kiam vi fion bezonas, ĝi estas for. Metode vi serĉas tion en ĉiuj ŝrankoj kaj tirkestoj; nenie ĝi estas. Fine vi perdas la paciencon kaj iel vin helpas sen ĝi. En la sama momento la serĉata objekto aperas aŭ sur la loko, kie ĝi kuŝas de ĉiam, aŭ sur la loko, kien ĝi tute ne apartenas kaj ĝi incitas vin tiel longe ĝis vi ree bezonos ĝin; tiam, kun miriga akurateco ĝi malaperos. Iuj homoj asertas, ke — se ili atendas tramon — ĉiam veturas vagonoj al la mala direkto. Mia konato volis do superruzi la sorton per tio, ke li intence iris atendi al la reloj irantaj al la mala direkto. Sed la sorto estas senkompata: ĝi liberiĝis el la insido per tio, ke ĉiam ĝi kaŭzis difekton de la elektra fluo, kaj funkciis do neniu tramlinio. Estas sennombraj la similaj okazoj. Ĝi estas simple leĝo.

Alia tia aperaĵo estas la leĝo de iotria. Ordinare ni atendas, ke afero rezultos tiel aŭ aliel; kaj jen, fine ĝi rezultis nek tiel nek aliel, sed ankoraŭ per alia maniero, kiu tute ne estis antaŭvidebla. Ni supozu — homo pripensas: Aŭ mi havos monon, kaj tiam mi aĉetos veston, aŭ mi ne havos ĝin kaj tiam mi ne aĉetos. Sed en tia okazo 1. aŭ homo efektive havas monon, sed la veston ne aĉetas, ĉar li devas riparigi la fornon aŭ pagi la loĝejluon aŭ 2. li ne havas monon kaj tamen

aĉetas la veston, kaj ankoraŭ, aldone, oni lin trompis. Garantiite. Neeviteble. Mi pensas: Aŭ tiu kaj tiu afero okazos, kaj tiam estos bone; aŭ ĝi ne okazos, kaj estos malbone, dio kun mi! Do, en tia okazo tiu afero venos, kaj estas malbone, dio kun mi! Simple la sorto. Ankoraŭ alia el la fatataj leĝoj estas la leĝo de serioj. Dum la tuta jaro vi ne renkontis sinjoron X., sed unu tagon, tondro lin frapu, vi lin renkontas sepfoje. Dum la tuta jaro vi ne venis sur placon Y., sed iam, faru kion ajn, vi troviĝas tie sepfoje en unu sola tago. Neniam iu donacas al vi leporon, sed subite vi, nenial, ricevas kvar leporojn el kvar anguloj de la mondo. La okazaĵoj havas strangan kaj — por tiel diri — malagrablan inklinon asociiĝi. Ĉiam vi devas pagi kelke da fakturoj je la sama fojo. La sorto havas manion ripetigi. Kiam vi havas plej multon por labori, vi ricevas sep gastojn, unu post alia. Dum via tuta vivo vi povas serĉi oran filikon; kaj foje, kiam vi malplej multe pensas pri ĝi, vi ĉiam trovas da ora filiko, kvazaŭ ĝi frenezigiĝis; eĉ ĉagrenas vin, ke estas tiom da ĝi. Laŭdire, sur la tuta mondo estas sole ses bluaj poŝtmarkoj de la insulo Mauritius; mi vetas, ke foje oni trovas ilin tri mil, kaj ili eĉ estos falsitaj. Tio estas la leĝo de serioj.

La homa vivo estas do regata per superaj leĝoj, kiuj evitas la naturordon kaj la sciencan klarigon. Ekzemple, kial ĝuste hodiaŭ ŝiriĝis mia botlaĉo? Kial mi devis renkonti kvar homojn, al kiuj mi ion promesis kaj ĝis nun tion ne plenumis? Kial mi, furiozante kaj blasfemante, duonhoron serĉis kravatton, kiun mi poste, kiam mi prenis alian, trovis trankvile kuŝantan sur la komodo? KREDU, ke eĉ la plej malgranda malagrabraĵo estas ĉirkaŭita de la mistero de fataleco; tial estas dece submeti sin al ĝi sindone kaj treme. Mi konas sinjorinon, kiu tenas, ekzemple, fondilon kaj subite la fondilo estas for; post dutaga malespera serĉado ŝi trovas ĝin per tio, ke ŝi sidiĝas sur ĝin. En tio ŝi vidas malican laboron de koboldoj. Mi opinias, ke ŝi fariĝas kulpa pri idolaneco kaj ega superstiĉemo. Ne ekzistas malicaj koboldoj. Ekzistas sole leĝoj. Neklarigeblaj kaj neeviteblaj leĝoj de la sorto.

Trad. R. H.

K. KALOCSAY:

KOROJN SUPREN!*)

Ho, kavaliroj de la Nova Sent',
Ni ekbruligu flamojn en la koroj,
Flugu de kor' al kor' tra l'homa gent',
Flugu la flagre festaj floroj!
Ĝemas mizere, en mallum' dronante
Tuta homaro sub malbona sorĉ',
Brilu de por ĝi ĉie, lumdonante,
Koro flamanta, kiel gvida torĉ'!

Ho, kavaliroj de la Pentekost'!
Lukti ni devas en bataloj multaj,
Jen malamikoj: la anima frost',
Blinda malam' kaj miskomprenoj stultaj,
Veoj alarmas por batal' benata,
Grandaj mizeroj vokas nin por arm':
Jen la armiloj: la laboro frata,
Brakoj brakumaj, kaj la kora varm'!

JULIE ŠUPICHOVÁ:

NĚKOLIK SLOV

K VYUĀOVACÍ METODĚ ESPERANTA.

Třebaže jest správným tvrzením, že dobrý učitel dosahuje vždy cíle, přece jen bude potřeba, abychom i my, esperantisté, vážně se zabývali otázkou vyučovacích metody esperanta. Reklama i úspěchy rumunského propagátora kněze *Andreea Cseh-a* zasluhují naši bedlivě pozornosti. Nesmíme se opozdit, tím spíše, že právě náš národ může se honositi pedagogem, který již před 300 lety se zabýval otázkou, jak řádně naučit cizímu jazyku. Mním tu *Komenského*, o němž jest známo, že k osvojení cizího jazyka žádal, aby se cvičil:

1. z r a k, a t o
 - a) čtením, jež učitel koná před žákem,
 - b) popisováním,
2. s l u c h, a t o
 - a) opakováním čtení,
 - b) posloucháním,
3. v ý s l o v n o s t, a t o
 - a) napodobováním hovoru,
 - b) hovorem samotným,
4. s l o h —
 - především napodobováním,

*) La poemon ni citas el la nova kolekto „Streĉita kordo“: de K. Kalocsay. Tiuj ĉi versoj verkitaĵ en 1920, ŝajnas al ni tre aktualaj ankoraŭ nun. Leĝu atente kaj lasu vin influi, precipe per la du lastaj versoj.

5. úsudek,

- a) odvozováním pravidel gramatických,
- b) užíváním jich k cvičením,

6. paměť —

zapařením slovních zásob.

Mluvnických pravidel Komenský nežádal, ale zařadil je až do praktického cvičení. Jest ovšem ještě mnoho pravidel, které vedle jeho pedagogických a didaktických zásad zasluhují pozornosti pro ty, kdož se zabývají otázkou správné metody pro naučení cizí řeči, neboť Komenský měl svou metodu přesně stanovenou na základě studia dítěte a svých znalostí jazykových.

Není však úmyslem těchto řádků, zabývat se historií, nebo rozbořem jazykových metod, chci se jen dotknouti nejnovějšího směru, neboť dojde nepochybně i pozornosti těch, kteří v brzké snad již době budou rozhodovati o otázce — *esperanto do škol!*

Na našich nových reformních školách zavádí se metoda čtení, zvaná intuitivní, která nutí žáka hned od počátku vhodně složenými texty pronikat k obsahu čteného — bez překládání. Autorem této metody je profesor pedagogiky v Dacca (Indie) Michael West (vysl. Uest). On nejen vědecky zdůraznil tuto metodu, ale prakticky ji vyzkoušel.

Podle universitního docenta a školského reformátora dra. V. Příhody, který Westovu metodu propaguje, vychází West z předpokladu, že čtení jest nejzajímavější a zároveň i nejsnadnější stránka jazyka, neboť nevyžaduje aktivní znalosti mluvnice, ani idiomatických výrazů a naopak spoléhá pouze na rozeznání významu slov, takže nepřetěžuje paměť. Učí-li se dítě číst a rozumět textu v cizím jazyku, jest jeho učitelem kniha, učitel jest jaksí jenom „pomocníkem“ (ceremoniářem). Záleží tedy všechno na metodě, jakou se připraví materiál pro četbu, jmenovitě v prvních stadiích. Dobrá učebnice podle intuitivní metody musí splňtí dvě základní podmínky: musí být zábavná a velmi snadná.

To je ovšem nezbytný požadavek psychologický, jehož dnešní škola plně dbá a v budoucnu nebude přehlížeti.

West vydal mimo jiné též brožuru „*Learning to read a foreign language*“ (Jak naučíme číst v cizím jazyce). Tam se dovídáme, že celé studium řeči podle této čtecí metody jest zcela pasivní a že — dokud není nezbytně nutno překládat, vůbec nepřekládáme. Cílem a snahou této cesty jest, aby dítě plyně četlo a rozumělo. O tom, zda porozumělo, se přesvědčujeme otázkami, k nimž žák

napiše odpovědi. Mluvíti hned v cizím jazyce nemusí.

Podle Westa jest dvoji typ čtenářů: 1. pozorovací a 2. hledající. První typ se zabývá každým slovem, druhý teprve hledá myšlenku. Pochopitelně, že první typ jest ve stavu ne-cvičenosti, jest to typ dětský, kdežto druhý, jest typ dospělý, vycvičený.

U nás se tato metoda zkouší na pokusných školách, zejména v latině a němčině na kome-ních od roku 1929. Na schůzi v Pedagogické jednotě Komenského, konané v Praze 20. ledna 1931, kde p. docent dr. Příhoda přednášel o čtecí metodě, byla hojná účast a živá debata dokazovala, že jde opravdu o věc velmi důležitou. Pedagogičtí odborníci se zatím k celé práci staví kriticky a konečně i sám průkopník Westovy metody u nás, dr. Příhoda praví: „O výsledcích prvých pokusů se nelze ještě vyjádřit. Podle dosavadních zkoušek jsou uspokojivé, zří-li se ke schopnostem žactva. V celku lze říci, že jsme teprve v počátcích pokusů. Kritika systému jest předčasná, neboť nutně se opírá jenom o dohady nebo o dosavadní empirii. Zatím má slovo pedagogický pokus.“

Prof. dr. Ogoun hodnotí podle dosavadní své praxe s Westovou metodou leksikální užítkovost, věštlí živost i zájem a konečně možnost práce i tam, kde nadání žákovo nestačí na mluvnickou analýsu.

Dojde-li nová (nebo i jiná) metoda ve vyučování cizím jazykům uskutečnění a uplatnění na škole národní, nastane i českým esperantistům povinnost — připravit ideální učebnici *esperanta*. Takovou, která bude ověřena prakticky a vyzkoušena, dříve než bude vydána! Podle Westa by měla taková kniha být vytištěna „po úmorném prostudování všech požadavků a po bedlivém prozkoumání nedostatku existujících učebnic (cvičebnic). Taková ideální kniha by měla být vytištěna jen pro 2—3 třídy pokusných škol, kde by bylo podle ní vyučováno pod dozorem autora, a měla by býti kritisována učitelem, dozorem, ba i žáky!“

Jest jisto, že vyučování cizím jazykům se stále přizpůsobuje moderním proudům a proto musíme i my uvažovati o nových požadavcích a jejich splnění. Budme připraveni!

OBNOVTE PŘEDPLATNÉ

ROZO „ESPERANTO“.

Nova beleĝa rozospeco baptita per nomo de nia lingvo.

Jan Böhm, posedanto de grandega, hodiaŭ jam tutmonde fama rozplantejo en la ĉeĥoslovaka urbo Blatná, donis al nova speco de rozo, rezulto de sia longa laboro, la nomon „Esperanto“.

La rozo „Esperanto“ estas eminenta hibrido devenanta el la konataj teo-rozoj. Ĝia burĝono havas kromordinare noblan longan formon kaj el ĝi evoluiĝas beleĝa granda floro en unike pura koloro malhelulfura. La koloro ne heliĝas eĉ dum plej forta sunbrulo, kio okazas eĉ aliaj terozoj. Riĉa florado daŭras de printempo ĝis malfrua aŭtuno. Apenaŭ iu rozospeco kulturita dum lastaj jaroj havas simile fortan kaj tamen delikatan aromon, kiu rememorigas la agrablan bonodoron de violoj. La arbusto atingas altan de 60—70 cm kaj estas tre rezista kontraŭ frosto.

La rozon, pri kiu jam forte interesiĝas ĉiulandaj fakuloj, eksportas en ĉiujn mondpartojn krom Ameriko rekte la suprenomita ĉeĥoslovaka kulturejo. Por Ameriko akiris la solan rajton por disvastigo la entrepreno Jackson & Perkins Co. en New York.

La rozplantejo de Jan Böhm, kvankam fondita nur en jaro 1918, apartenas hodiaŭ al la plej famaj. En submontara klimato estas tie kulturataj daŭre proksimume 500.000 rozoj de plej diversaj bonegaj specoj, eksterordinare rezistaj en ĉia vetero.

En Ĉeĥoslovakio fariĝis popularaj la ekskursoj al la paradizaj rozoĝardenoj en plena florado, sed Jan Böhm ricevas ofte vizitojn ankaŭ el malproksima eksterlando. La altan spiriton de de la rozisto karakterizas la fakto, ke li donis al speciale bela nova rozospeco la nomon „Briland-Paneŭropo“ kaj nun li ĝin denove dokumentas per la nova rozo „Esperanto.“

Ni ĝoju, ke nun ankaŭ nobla floro portas la famon de nia lingvo en la mondon. O. G.

Kiu deziras servi bonan aferon, bonvolu publikigi tradukon de supra artikolo kaj sendi 1—2 ekz. de la koncerna gazeto al adreso: S-ro O. Ginz por Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Stárkova 4, Praha II., Ĉeĥoslovakio. — Ĉiu sendinto ricevos luksan faldprospekton pri Praha.

Fermentita pano. Fermentado estas tre malnova invento devenanta de praoriginoj de la homa kulturo. Tamen certe estas, ke fermentita pano estas manĝata en Eŭropo proksimume du mil jarojn. Antikvaj historiistoj rakontas, ke bakistoj de malnovepokaj popoloj produktis fermentitan panon samtempe kun la nefermentita kaj disvendadis ĝin nur en la dua jarcento antaŭ la Kristnasko. Romanoj disvastigis bakistan metion ankaŭ al la Meza Eŭropo, kie poste Slavoj komencis uzi al produktado de fermentita pano sekalan farunon. Dum la tuta mezepoko kaj longan tempon ankaŭ dum la novepoko estis eĉ ni pano privilegio de riĉuloj, por simpla popolo kaj kampulo ĝi estis malofita frandaĵo; sur la tablo de malriĉuloj ĝis la deksepa jarcento oni vidis nur platukojn, panon ili manĝis nur dum grandaj festotagoj kaj dum familiaj festenoj. Longan tempon pano estis fermentata per hejma fermentilo; nur en la deksepa jarcento bakistoj komencis uzi bierfarejan feĉon; pura cereala feĉo t. n. premita feĉo estas vendata nur depost la jaro 1867. La hodiaŭa pano estas do rezulto de miljara homa klopodo aliĝi farunon en manĝaĵon laŭeble plej bongustan kaj plej agrablan, kapablan esti konservata kaj transportata. Milo kaj miloj da eksperimentoj, amaso da hazardaj kaj laŭcelaj provoj faritaj senintence kaj intence akompanas la vojon de faruno al la hodiaŭa pano de moderna homo. Pri la afero ni ekscias nur tre supraĵe el hazardaj arkeologiaj kaj prehistoriaj trovaĵoj; pli multe diras al ni multaj popolaj kutimoj, tradicioj konservataj de popolo kaj spertoj de eŭropaj kaj ekster-eŭropaj etnografoj.

(K. Kavina, Obilí; Knihy pro každého sv. 34.)

Trad. J. Řebíček.

ĈU VI SCIAS TION?

1. Ĉu la homa koro estas efektive sur la maldekstra flanko de la korpo?
2. Kiom da tempo bezonas la sango de la homa korpo, elirinta el la koro, por reveni al ĝi?
3. Kial eburo estas minata en Siberio?

Respondoj. 1. Ne tute, ĝi kuŝas proksime al la meza linio de la korpo. — 2. Proksimume 30 sekundoj pasas inter ĝia foriro de la maldekstra korventriklo (korkamero) ĝis ĝia reveno tien. — 3. Ĉar grandaj kvantoj da ĝi estas troveblaj tie; ili estas ŝtoniĝintaj dentegoj de mamutoj kaj mastodontoj, kiuj estis konservitaj dum miloj da jaroj en la glaciiginta tero.

F. Pytloun.

*Usnadnite nám včasné vycházení
včasným zasláním předplatného.*



Mekanikisto kaj pentristo. En sia studaĵo pri la centra Azio laŭ la novaj trovaĵoj, publikigita en la revuo de Ĉeĥoslovaka societo geografia, Dro Pavel Poucha notas belan rakonton pri mekanikisto kaj pentristo, el orienta Turketano, el tempoj de antikvaj Tofaroj, kiuj loĝis en tiu parto de la tero jam en la tria jarcento antaŭ Kristo. Ĝi estas fabelo pri artefarita homo: „Iun tagon venis en la dometon de mekanikisto pentristo, vojaĝanta tra lia regiono, kaj petis la mekanikiston pri loko por tranokti. La mekanikisto prezentis al la pentristo ĉiujn gastamikaĵojn, kiujn decas doni al vojaĝanta fremdulo, destinis por li ĉambron kaj liton kaj por priservi lin li donis al li belan junulinon, kiun per sia arto li mem faris el ligno, moviloj kaj vestaĵoj. Kaj li foriris al sia laboro. La junulinon-mekanismon estis neeble diferencigi de la vera homo. Si estis tiel bela, ke la pentristo eksopiris je ŝi, kaj kiam la servistino eĉ ne vorton parolis, li ektuŝis ŝian manon kaj ekprenis ĝin. Sed tiam la mekanismo tertuŝiĝis kaj anstataŭ la bela junulino estis ĉi tie amaso da ligno, moviloj kaj vestaĵoj. La pentristo estis komence tute konsternita pro sia ago, sed poste kaptis lin la ideo, kiamaniere sian agon kontraŭpesi per alia ago. Li mem estis eminenta artisto. Li do pentris sur la pordaj traboj sin mem kiel sinpendiginton, kaj tion (li faris) tiel nature, ke la mekanikisto, reveninte kaj vidante sur la tero sian roboton kaj sur la pordo la ŝajne sin pendigintan artiston, opiniis, ke la pentristo pendigis sin pentante sian agon. Li do kuris el sia domo kaj diris tion al la reĝo, estante plene malfeliĉa. La popolo alkuris al la domo, sed baldaŭ oni trovis, ke temas sole pri lerta pentraĵo. Dum la pentristo mem reaperis kaj la popolo disiris ridante.“ Simila rakonto estas konata ankaŭ ĉe Tibetanoj kaj Ĉinoj. La ĉina filozofo Si-ci rakontas pri artefarita homo junulo, kiu scelis marŝi, riverenci, kanti kaj eĉ koketi kun edzinoj kaj sklavinoj de la reĝo, al kiuj li estis prezentita.

?

Por rompi la kapon. Ĝuste en la momento kiam dormanto vekigis, li aŭdis, ke turhorloĝo batas unufoje. Li ne povis ekdormi kaj li aŭdis, ke ankoraŭ trifoje, en duonhoraj intervaloj, la horloĝo batas po unufoje. Entute do kvarfoje po unu bato, kvankam ĝi estis la horloĝo, kiu per unu bato anoncas sole duonhorojn, dum la tutaj horojn ĝi batas per tiom da battoj, kioma horo estas. Kiel ĝi estis ebla? La solvon ni alportos venonte, espereble iu el niaj legantoj skribos ĝin, al ni.

LINGVA FAKO

NAŜE PĚKLADEVĚ TEXTY.

Budeme i v tomto ročníku uveřejňovati pokud možno v každém čísle takovéto texty. Překládejte je a překlady svoje nám z a sílejte. Cím více překladů dostaneme, tím lépe můžeme zjistiti, jaké vysvětlivky máme přidati na konec nejlepšího překladu, který otiskujeme pak v čísle příštím. Překlady, které dostaneme do tří neděl, po vyjítí čísla, bĕreme v úvahu při losování o udĕlení knižní odměny za nejlepší překlad.

Doporuĉujeme též klubům, aby vyzvaly své členy přeložiti naše texty a přinĕsti je do příští schůze. Část takové schůze může býti věnována vzájemnému srovnávání přinesených překladů. Dle dosavadních zkušeností toto srovnávání věty za větou dává velmi zajímavý program členské schůzi a poskytuje znamenité cvičení jazykové, jímž se zejména prohlubuje znalost esperanta — i češtiny. Dosud dostali jsme takové překlady od klubů na Kladně a v Hradci Královĕ. Slezští esperantisté ve své REL právě zavádĕjí podobná cvičení.

Texty naše budou opětně střídavĕ lehĉi a těžší.

31. TEXT K PĚKLADU.

Původní lidé prý rozumĕli řeĉi stromů a zvířat. Utíkal vlk a pravil sedlákovĕ: „Buď tak laskav, sedláĉe, schovej mĕ, ženou se za mnou myslivĉi!“ Moucha přinesla zprávu princovĕ a buzuĉela mu do ucha. Kůň pod bohatýrem zaplakal. Careviĉ přikryje svým šatem zmoklá mláďata ptaĉi v lese. Tu přiletí veliký pták, matka těch ptaĉků, a spatří, že mláďata jsou přikryta. Řekl: „Kdo přikryl moje mláďata? Budeš-li mne v nouzi potřebovat, vzpomeň si na mne!“ Kvĕtina má svou řeĉ, i drozd má svou řeĉ, ale lidé ve shonu života nemají kdy poslouchat a uĉit se jí.

(Dle J. Herbena.)

SICE, OVŤEM, ARCI

1. JA

On je sice mým pĕitelem, ale jeho jednání neschvaluji. Slůvkem „sice“ připouŝtím pravdivost urĉité skuteĉnosti ve větĕ hlavní (že on je mým pĕitelem, ale větou vedlejší zamezuji ĉiniti z té skuteĉnosti nesprávnĕ závĕry. Esperantem: *Li estas ja mia amiko, sed mi ne aprobas lian konduton.*

Jiná věta: *Li estas ja plene kulpa, tamen oni devas lin kompati* = je sice naprosto vinen, nicménĕ je nutno ho politovati).

Ni perdis ja multon, tamen ni eltenos = ztratili jsme sice mnoho, přesto vydržíme.

2. ESTAS VERE

V poslední větě se smysl vůbec nezmění, jestliže místo „ja“ vložíme „estas vere“ (= pravda).

Ni perdis — estas vere — multon, tamen... Li fanfaronas ofte — estas vere — sed tiun ĉi fojon ni povas kredi lin.

I v prvních dvou větách prvního odstavce mohli bychom „ja“ nahraditi: Estas vere, li estas mia amiko... „Estas vere, plene kulpa li estas... Ale slůvkem „ja“ vyjádříme se kračejji a vyvarujeme se dvou „estas“ v souvětí.

Podobný smysl mají tyto věty, nahradíme-li „ja“ slovem „certe“ (v češtině „zjistě“) nebo „sendube“ (nepochybně, rozhodně). *Certe li estas mia amiko, sed lian konduton mi ne aprobas. Li certe estas plene kulpa... Sendube (= tute certe) ni perdis multon, tamen...*

Ve všech udaných větách můžeme dále říci v češtině místo „sice“ též „ovšem“, „arci“, „arci“: On je ovšem (arci) mým přítelem, ale... On je arci (ovšem) naprosto vinen, nicméně...

Smysl všech takovýchto vět bychom mohli vyjádřiti větami podobnými, jinak stavěnými: *Kvankam li estas mia amiko, (tamen) mi ne aprobas lian konduton. — Kvankam li estas plene kulpa, (tamen) oni devas lin kompati. — Kvankam ni perdis multon, (tamen) ni eltenos. — Kvankam li fanfaronas ofte, (tamen) tiun ĉi fojon ni povas kredi lin.*

Někdy nalezneme u Zamenhova spojku „kvankam“ v takovém smyslu, že se rovná českému „sice“:

La sorto donis al mi rolon, *kvankam* tre flatan, *tamen* samtempe ankaŭ tre ŝarĝan = Osud dal mi úlohu, velmi lichotivou sice, přes to zároveň velmi obtížnou.

Uhrnem:

Sice = ja, estas vere, certe, sendube.

A sice (= a to).

Bylo přítomno 6 osob a sice: *Ĉeestis 6 personoj nome la jenaj...* Hmd.

NĚCO PRO SAMOUKÝ A KURSY.

V minulém ročníku zavedli jsme tuto rubriku v očekávání, že se setká se zájmem našich čtenářů, hlavně těch, kteří žádají praktických cvičení k zdokonalení se zejména v konverzací. Uveřejnili jsme článek Nia kurso ĉesky a v dalším čísle jeho překlad. Slíbili jsme, že přineseme příklad konverzací sestavený z toho článku. Příklad ten následuje. Doporučujeme těm, kteří se těchto cvičení chtějí účastniti, aby nahlas čli si otázky i odpovědi. Aby si přečetli znovu pouze otázky (opět nahlas) a snažili se na ně odpověděti. Svou odpověď pak zkontrolujte s naší odpovědí tištěnou. Poté pokuste se dávat si otázky pozměněné, (na př. v jiné osobě, v jiném čísle nebo čase). To vše opakujte tak, abyste plynule dovedli nahlas odpovídati.

Ĉu vi lernas esperanton? (Obměněná otázka:

Ĉu vi lernas la lingvon internacian „esper-

anto“? Ĉu ankaŭ vi lernas esperanto-lingvon?)

Jes, mi lernas ĝin.

Kie vi lernas ĝin? Kie vi ĝin lernas?

Mi lernas ĝin en la kurso. Mi vizitas kurson de esperanto.

Kie okazas via kurso?

Ĝi okazas en la lernejo.

Kie estas la lernoĉambro? Kie estas la ĉambro, en kiu okazas la kurso de esperanto?

Ĝi estas en la dua etaĝo.

Kiom da etaĝoj havas la lernejo?

Ĝi havas du (tri) etaĝojn.

Kiel (kiamaniere) oni venas en la etaĝojn?

Oni devas iri la ŝtuparon.

Kien iri? Supren iri.

Kiom da homoj povas sidi en la ĉambro?

En ĝi povas sidi sepdek personoj.

Kiom da homoj povas sidi en unu benko?

(Kvin homoj...)

Kial kvin? — Ĉar la benkoj estas tre longaj.

Kiel staras la benkoj?

Ili staras en du grupoj, vicoj, la maldekstra apud la fenestroj, la dekstra apud la kontraŭa muro.

Kie ni sidas? (...en la benkoj)

Kien ni metas la kajerojn? (...sur la benkojn.)

Kion faras la instruisto (la kursestro)?

Li instruas, klarigas, demandas, ekzamenas, korektas.

Kion li instruas? (...esperanton)

Kiun li instruas (...nin, lernantojn)

Kion li instruas al ni? (...esperanton)

Pri kio li instruas nin? (...pri esperanto)

Kion faras la kursanoj? (...aŭskultas, atentas, respondas, skribas...)

Kiu ekzamenas la kursanojn?

Kial li ekzamenas ilin? Por scii, ĉu ili bone lernis. Li volas scii, ĉu...

Kiel li demandas ilin? (en esperanto)

Kial li demandas ilin esperante? Por ke ili lernu paroli en esperanto. Por ke ili respondu ankaŭ en esperanto.

EI la Biblio (I. Kroniko, 11)

Ĉiuj plejaĝuloj de Izrael venis al la reĝo kaj David faris kun ili interligon.

Ili sanktoleis Davidon reĝo super Izrael.

Konforme al la vorto de la Eternulo per Samuel.

David venkoprenis la fortikajon Cion.

Všichni starší Izraelští přišli ke králi a David učinil s nimi smlouvu.

Pomazali Davida za krále nad Izraelem.

Podle slova Hospodina skrze Samuel.

David vzal hrad Sion.

Ili venkobatis la Filistojn. Porazili Filiŝtinské.

Kiu trinkigus al mi akvon el la puto? Kdo by mi dal píti vodu z té studně?

La Eternulo faris lin (Davidon) timata de ĉiuj nacioj. Hospodín způsobil, že se ho báli všichni národové.

EL ESPERANTO-MONDO

24. Kongreso de Esperanto en Paris

30. Julio — 6. Aŭgusto 1932.

Adreso:

Maison de France, 101, Av. des Champs-Élysées
Paris.

La kongreso okazas laŭ oficiala invito de la Komerca Cambro de Parizo. Aldone al la informoj publikigitaj en nia 7. n-ro:

Por Ĉeĥoslovakoj estas plej oportune pagi pere de Poŝta Sparkaso en Praha. Se vi havas konton ĉe la Poŝta Sparkaso en Praha aŭ Brno vi pleniĝos la t. n. kaso-ĉekon per adreso: XXIVe Congrès Universel d' Esperanto, Paris 1647-59 kaj per sumo 125 francaj frankoj, kaj sendos ĝin al la ŝparkaso. Tiu ĉi deprenos la sumon el via konto, transkalkulinte ĝin je ĉs-kronoj. Se vi mem ne havas fian konton, interkonsentu kun via klubo aŭ iu konato aŭ turnu vin al nia kasisto S-ro Otto Skleněčka, Hradec Králové 628-a.

Gejunuloj, kiuj havos ne pli ol 17 jarojn la 1-an de aŭgusto 1932 povas ricevi junulan kongres-karton po 30 francaj frankoj (40 Kč). Oni donos senpagajn kongreskartojn al esperantistaj blinduloj kaj po unu al ties gvidantoj vidantaj. Garantia kaso sumas je la fino de decembro 120.000 fr. (160.000 Kč). La minimuma garanti o por ĉiu subskribanto estas 500 fr.

Fervoj a r a b a t o: 50% por ĉiu ir-kaj revenbileto sur francaj fervojoj. Pro la ŝtata imposto la rabato kvindekprocenta reduktiĝas al 42½%.

33% sur ĉeĥoslovakaj fervojoj, laŭ rabatilo havebla pere de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. — Plia malkarigo estas nun traktata kaj ni informos pri ĝi tuj, se la projekto sukcesos.

Vizon francan ĉsl. ŝtatanoj ne bezonas havi. Ĝis la fino de 1931 aliĝis entute 75 kongresanoj el 10 landoj: Belĝujo 13, Ĉeĥoslovakujo 1, Francujo 25, Germanujo 4, Granda Britlando 15, Hispanujo 2, Italujo 1, Nederlando 2, Polujo 9, Svedujo 3.

Kongresa gazeto eldonata de LKK estas sendata senpage al ĉiuj kongresanoj. La ĉefredaktoro estas la fama aŭtoro Raym. Schwartz, kies nomo garantias interesan enhavon. La januara numero aperis sur 16 paĝoj, interesa en ĝi estas la artikolo pri la organizantoj de la XXIV-a kun iliaj portretoj. Aliaj artikoloj estas: Parizo por komencantoj. Pri la Franca Societo Esp. Mallonga historio de Francujo. Ni babladiu pri Parizo k. a.

* * *

Ce-metod=an kurson por 100 personoj gvidis en Parizo F-ino Elinjo Pähn. En la fino de la kurso la lernantoj pro dankemo por la mirinde bela instruado donis al ŝi kiel memoraĵon porvojaĝan valizeton kun tuta ilaro.

La plej grava verko de Sun-Yat-Sen, la fondinto de la Ĉina Respubliko „La tri principoj de la popolo“ estis tradukita en esperanto.

En japana urbo Osaka oni disaŭdigis radioesperanto-kurson, kiu daŭris de 20. Julio ĝis 31. Aŭgusto. En tiu tempo estis venditaj 18.000 lernolibroj de esperanto, 1.200 personoj sendas kopion de diktaĵo por ekzameno.

En la budĝeto de la hispana ministerio de instruado troviĝas sumo 50.000 pesetoj (150.000 Kč), kiel subvencio al Esperanto-Instituto por starigi katedrojn en 14 grandaj urboj.

La 9-a kongreso de Laborista Esperanto-Asocio de Germanujo okazas dum Pasko 1932 (28. Marto) en Eisenach.

Pri nia samlandano S-ro Willy Burgemeister el Varnsdorf ni legas en „Sveda Laborista Esperantisto“: „Dum sia bicikla iro li faris publikajn paroladojn en 63 lokoj pri Ĉeĥoslovakio, pri esperanto kaj pri sia aventura vojaĝo tra Eŭropo kaj Afriko (norda) kaj krom tio li faris 25 provlecionojn laŭ la Ĉemetodo, ĉefe en la sveda provinco Vermlando.“

La Magistrato de Cannes (Francujo), fame konata urbo kaj ĉiuvintre vizitata de multaj allandanoj, decidis uzi esperanton por la trafika signalado. De nun ĉiu indik-tabelo, ĉu fosta ĉu mura, estos redaktata france kaj esperante. La unuaj indikoj estis starigitaj en Novembro kaj tre bone efikas.

Ankaŭ en la ĉarma urbeto Cagnes-sur-Mer, kuŝanta sur la Lazura Marbordo inter Cannes kaj Nice kie loĝas aŭ kien venas labori ĉiulandaj pentristoj oni starigis la unuajn indikfostojn: „Halto por Aŭtobusoj“. Aliaj sekvos.

Kupim výtisk ročníku 1924 „Nových illust. listů“ v Brně. J. M. Bakalář-Srbecký, katecheta v. v. v Podivíně, Morava. —

Personaj informoj.

S-ro Lad. Brambora, sekr. de „Esperanto kaj Komercio“ en Praha kaj F-ino A. Marešová — geedzoj.

S-ro Jan Molnár kaj F-ino Zlatohlávková en Praha — geedzoj.

Koran gratulon!

Nevěra.

Vi helpos sciencan laboron, se vi bonvolos konstati, ĉu en via loko ne loĝas persono kun tiu nomo (event. Niewiera). Temas pri esploroj, kiu estas deveno de tiu familio. Eventualajn informojn sendu rekte al s-ino Erna Pflug VD de UEA, Königsberg in Preussen, Dammgasse 9, Germanio.

Slovník obchodně - technický, účetní a daňový. Sešit č. 22 - 24/IV. obsahuje: Káva - Káloviny - Keramický průmysl - Keřlův účetní systém - Kina - Klasifikace zboží - Klempířství - Klib - Kloboučnictví - Klobouky - Knihy - Knihařství - Knihupectví - Knihovní podání - Knihovní výpisy - Knihovny - Knihotiskárny - Knihy obchodní. - Expedují Tiskové podniky ú. S. Č. P., Praha I. Masarykovo nábřeží 4. Cena sešitu Kč 19,50.

KIU HELPOS EN SERIOZA ENKETO?

Sveda etnografia muzeo serĉas korespondantojn en regionoj, kie ankoraŭ vivas la memoro

V kursech, které chystáte, použijte ... Svým známým k domácímu učení doporučujte ...

**UČEBNICE A CVIČEBNICE
MEZINÁRODNÍHO JAZYKA**

ESPERANTO

OD PROF. DRA ANT. ŠILHY

96 stran. — Cena Kč 1060 s portem.

Při odběru aspoň 5 výtisků sleva.

Vydalo La Progreso, Praha VII.

pri pasintaj tempoj, kiam la vilaĝanoj kulturis linon kaj kanabon kaj tondis la ŝafojn por produkti al si mem el tiuj materialoj per primitivaj iloj teksaĵojn kaj vestojn. Kiu volas serioze sin okupi je la enketado, skribu al Universala Esperanto-Asocio, Hradec Králové 628-a, kiu peros la ekrilatton kun la sveda kompetentulo.

DO NOVÉHO ROČNÍKU.

Zahajujeme tímto číslem nový ročník, již čtrnáctý našeho Progresu. Šest ročníků jeho vycházelo v Plzni, kde časopis byl založen v roce 1918 nadšenými a pilnými samideány plzeňskými a řízen zvěčnělým red. Tittlem. V roce 1923 nabídnuto další vydávání Svazu. Svaz však rozhodl se nebratí na sebe risiko s vydáváním Progresu, uváživ veškeré nesnáze takového kolektivního podnikání. Risiko to vzal na sebe tehdejší gen. sekretář Svazu a vydává Progreso v Praze letos již v osmém ročníku. Je všeobecně známo, že Progreso je jeho podnikem, tak jako na př. Heroldo de Esperanto je podnikem p. Junga a p. Je však také spravedlivě uznávána skutečnost, že Progreso vždy hájilo jednotnou linii čl. hnutí a stálo vždy po boku Svazu. Budeme tak činit i nadále v přesvědčení, že nikoli roztržičně, nýbrž sjednoceně můžeme zdárně postupovati a dosáhnouti cílů, k nimž Svaz směřuje.

Udržujeme Progreso na jeho obsahově vysoké výši po celých sedm let. Naši čtenáři sledali již v minulém ročníku, že redakce stále pracuje na zdokonalování obsahu, zaváděním nových nebo prohlubováním starých rubrik. Budeme v tom pokračovati i nadále. Uznání našich čtenářů, projevované zejména v poslední době mnoha nadšenými dopisy, nám stačí. Děkujeme všem, kteří nám dali na jevo, že se těší s námi skutečnosti, že Progreso přestálo doby kritické bez snížení úrovně. Doufáme, že budeme moci je potěšiti v době nejbližší i tím, že vyrovnáme časové zpoždění, čímž nám bude umožněno vycházeti pravidelně.

Na radu odborníků změníme poněkud zevnějšek časopisu. První krok k tomu činíme již v tomto čísle a během roku budeme pokračovati.

Po finanční stránce máme plnou důvěru. Nikdy se nestalo, aby ihned po skončení ročníku, ještě před vydáním prvního čísla, došlo tolik přihlášek na nový ročník, jako tentokrát. Tato důvěra nás těší. Tato důvěra nás zavazuje. Tato důvěra nebude zklamána.

Díky všem!

Redakce.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.
NUMERO 42. - JANUARO-FEBRUARO 1932.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista kaj Germana Esperanto-Liĝo
invitas ĉiujn esperantistojn en Ĉeĥoslovakio,
organizitajn aŭ ne,
partopreni grandnombre en la

V-a ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTA KONGRESO

okazanta 14—16-an de majo 1932
EN OLOMOUC.

Provizora programo:

- Sabaton:** Vespere senprograma kunesto en restoracio.
Dimanĉon: Je la 9-a malferma kunveno. — Je la 12-a: Plantado de la Esperanto-arbo. — Je la 14-a: Laborkunsido. — Je la 17-a: Vizito de la urbaj vidindaĵoj. — Je la 20: Amuza vespero kun programo.
Lundon: Je la 9-a: Labora kunsido. — Je la 12-a: Komuna tagmanĝo — Posttagmeze: Ekskurso.

Samideanoj! Nova ondo de aktiveco en nia movado konstatebla dum la pasinta jaro kaj videbla en granda intenseco kaj diverseco de laboroj de nia Asocio kaj de diversaj lokaj samideanaj grupoj faras nepre bezona, ke ni post iom longa paŭzo kunvenu denove. — Por du celoj: unue por manifesti por niaj postuloj; due por interkonsenti pri komuna linio de nia laborplano kaj por ĉerpi el reciproka interkonatiĝo novan forton por persisto en laboroj komencitaj. Per aranĝo de la kongreso estas komisiitaj samideanoj en Olomouc. La konata sperteco kaj laboremo de ili garantias, ke kongreso estos bonege preparita. La urbo mem estas alloga por multaj. Tial venu ĉiuj!

Por Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista

Dr. St. Kamaryt,
prezidanto.

O. Ginz.
ĝen. sekretario.

Aliĝu tuj! Vi helpos per tio al sukceso de la kongreso. La kotizo kongresa estas 15 Kč. (por familianoj, laboristoj kaj studentoj 10 Kč). Hotelĉambroj ne estas multekostaj, la loka komitato prizorgos ilin je taŭga prezo antaŭe pagata. Komuna loĝejo po 6 Kč, por studentoj kaj laboristoj po 2 Kč. Sendu la kotizon aŭ per poŝtsparkasa transpagilo (blanko-pagilon pleniĝu per nomo „Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc“ kaj per n-ro „203.025 Praha“) aŭ

petu aliĝilon kun la transpagilo. Kongresanoj el Bohemio povos uzi specialan trajnan aranĝatan de la Fervojdirekcio laŭ kutimaj kondiĉoj, forveturantan el Praha sabaton vespere kaj revenantan lundon nokte, tre malkaran. Interesantoj anoncu sin jam nun ĉe s-ro O. Ginz, ĝenerala sekretario de CAE en Praha II. Stárkova 4. Ili ricevos prospekton ĝustatempe. Ĉiun ceteran korespondaĵon adresu al Esperanto-kongreso en Olomouc, Riegrova 17.

ESPERANTO-ARBO EN OLOMOUC.

Olomouc, fama reĝa ĉefurbo de Moravio, gastigis inter siaj historiaj muroj jam multajn diversajn kongresojn kaj la urbo mem posedas sufiĉe da interesaj vidindaĵoj, ne toveblaj aliloke. Sed tiun ĉi fojon la LKK invitas la tutmondan esperantistaron por partopreni ĝian feston. Tiujn, kiuj ne povos partopreni persone, precipe la grupojn ni petas, ke ili bv. sendu iom da internacia nutraĵo—iom da humo—por nia vivonta monumento, „arbo Esperanto“, kiun ni plantos dum nia kongreso en nia bela urba parko por honorigi la kreinton de Esperanto Dr. L. L. Zamenhof, ĉar por pli inda monumento mankas al ni la mono. Kun la humo sendu ankaŭ dediĉaĵon, kiu estos dum la planta ceremonio legata. Grupo, kiu volus havi sian nomon ĉizita sur la almetota memortabulo, devus sendi por tio 50 Kč. La nomojn de sendontoj ni publikigos ankaŭ en naciaj gazetoj. Ankaŭ nomigon de strato Dra Zamenhofa ni projektas.

La LKK konsistas el jenaj personoj: p. Kudela, v. p. Neužil, sek. Mastný, kas. Štěrbá, komit. Mrázková, Řebíček. Adr: Esperanto kongreso, Olomouc, Riegrova 17.

Ĝis nun aliĝis al la kongreso:

1. Luĉjo Neoral, 4 jara, parolanta flue nian lingvon, el Olomouc.
2. Ant. Kudela, oficisto Olomouc,
3. Jos. Řebíček, ferv. ĉefkonsilanto, Olomouc,
- 4—5. Frant. Heikenwälder kun edzino, oficisto, Prostějov.

Ant. Kudela

LA 8. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis marde la 26. Januaro 1932 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis S-ro Ginz, S-ino Herzigová, S-roj Hromada, Janda, Slavík, Staněk Fr., Sustr kaj F-ino Tarantíková. Senkulpigis sin Dro Pítlík kaj S-ro Votrubec. — Prezidis S-ro Ginz, protokolis F-ino Tarantíková. — Daŭro de 20.45 ĝis 23.45 horo.

El la protokolo ni publikigas:

Loterio por esperanto.

Nia komitatano F-ino Vlčeková en Kladno sendis proponon aranĝi loterion por finance plifortigi la Asocion kaj per tio la propagandon. 100.000 venditaj lotbiletoj po 2 Kč donus fortan subtenon. La komitato opinias, ke ni ne sukcesus deponi la necesan garantion al la Lotoficejo. Ankaŭ la malsukcesoj de similaj entreprenoj videblaj en la lasta tempo meritas pripenson. Ni esploros la eblecon aranĝi specon de tombolo

en malpli granda grado. Konsiloj de niaj membroj estas petataj.

Skoltoj.

Ni traktas kun la centro de ĉsl. skoltoj pri nia afero. S-ro Csáder en Bratislava estas preta gvidi laborojn inter la skoltoj-esperantistoj. Ankaŭ tiun ĉi aferon ni rekomendas al la legantoj por pripensi, kiel ili povus kunlabori.

Fervojistaj insignoj.

S-ro Pytloun, fervojisto en Bakov n. Jiz. kaj fervora propagandisto, atentigas, ke en pluraj landoj estas oficiale permesite ke la fervojistoj-esperantistoj portu en deĵoro esp. insignon. Tio multe helpas al la vojaĝantoj, kiuj scias esperanton. Li proponas zorgi pri io simila en nia lando. Post enketo pere de ICK ni zorgos pri tio.

Gvidfolio Praha

Nova eldono estas preparata. Se iu ankoraŭ nun deziras fari utilan proponon pri la enhavo, li bonvolu fari tion tut. Kun la Ligo de katolikaj esperantistoj ni traktas pri plipreso de pliaj ekzempleroj, kiujn ĝi eble deziras, laŭ nerekta informo.

Komerca Cambro en Praha

deziras informojn pri la potenco de la esp. movado en ĈSR, precipe en la komerca sfero. Utilajn sugestojn de niaj legantoj ni danke akceptos. —

Propagando en Subkarpata Rusio.

Al S-ro Jandík en Užhorod ni proponis liveri 50 ŝlosilojn ukrainajn, ĵus aperintajn, kun la peto disvendi ilin kaj tiel helpi al la disvastiĝo de nia lingvo en tiu ĉi plej orienta parto de nia respubliko.

State ekzamenitaj esperanto - instruistoj.

Subvencio Kč 150.— el Fondaĵo tiucela estis voĉdonita al F-ino Margit Feldmannová, instruistino de popola lernejo en Kežmarok, por parte kompensi ŝiajn elspezojn pro la vojaĝo al Bratislava, kie ŝi sukcese faris esperanto - ekzamenon.

Ministerio de fervojoj.

(Pariza rabato). La ministerio informis nin, ke rabatiloj por vojaĝo al la Pariza kongreso estos donataj laŭ listoj prezentotaj de nia Asocio.

(Rabato Olomouc.) La Direkcio fervoja Praha-Jih informis nin, ke la petskribo de LKK Olomouc, adresita al ĝi, ne apartenas al ĝia kompetenteco, ĉar en tio decidis la ministerio mem. Ni intervenos tie. —

(Noto de la redakcio). Lastmomente ni ricevis informon, ke ekzistas ebleco de tre surpriza aranĝo, kiu ebligus al multaj viziti malmultekoste la ambaŭ kongresojn. Se la afero sukcesos, ni informos pri ĝi tuj.

Kongreso Olomouc.

Financoj. Dro Kamaryt proponas, ke la kongresa kotizo estu 15 Kč, por familianoj 10 Kč. Aprobata. — LKK estos petata prezenti la kongresan budĝeton por aprobo. — Asocio kune kun GEL donos al LKK en Olomouc po 500 Kč por preparaj laboroj. — La kongreso estas aranĝata je risko kaj profito de ČAE, GEL kaj Esperanto - Societo en Olomouc. — LKK deziras informon pri tio, kion ni povas liveri por la ekspozicio. Respondos la administranto de la ekspozicia materialo S-ro Sustř. Ankaŭ li petos S-ron Sklenčka sendi lian materialon. — Esperantoflagojn Asocio aĉetos kaj disponigos al Olomoucanoj. — Pri la programo korespondas kun LKK nia prezidanto mem.

Biske.

S-ro Hromada informas, ke S-ino Biske akuzis lin kiel respondan redaktoron ĉe la tribunalo pro la alineo Afero Biske, publikigita en Bulteno Marto 1931 kiel parto de la Komitata raporto al la ĝenerala kunveno. Necesaj aranĝoj estis aprobitaj.

Ĝenerala kunveno de ČAE

okazos verŝajne la 20. Marto 1932 en Praha La kutima jara raporto agada kaj financa aperos en Bulteno antaŭ la kunveno.

Esperanto en poŝta trafiko.

S-ro Votrubec prezentis vastan proponon pri tiu ĉi afero. Asocio ĝin transdonos al ICK en Genevo por prijuĝo kaj interkonsilo kun aliaj Naciaj Societoj.

Antologio ĉeĥoslovaka.

En la venonta kunveno ni traktos pri la respondoj venintaj al nia cirkulero pri la Ĉeĥoslovaka Antologio. Ĉar la entrepreno povas sukcesi sole per kolektiva laboro de ĉsl. esperantistoj, ni refoje petas la respektivajn samideanojn, respondi nian cirkuleron ricevitajn en printempo 1931. —

Radio - Journal Praha

informis nin, ke por eviti ĉiujn misaranĝojn, ĝi estonte ĉiam interkonsentos kun Asocio, se temas pri esperanto - disaŭdigo.

Diversa.

La aranĝantoj de la publika diskuto pri la

internacia lingvo en Karvinná la 23. Februaro petis nin sendi oratoron kaj informi la Instituton kaj esperanto - klubojn en Moravio kaj Silezio, La informajn cirkulerojn ni dissendis kaj S-ron Křetínský ni petis estis nia parolanto tie. — Prof. Kožený informas, ke fonda kunveno de nova klubo en Mladá Boleslav okazas 30. Jan kaj li deziras, ke partoprenu samideanoj de Praha. Anoncita kaj rekomendita en Esp. Klubo de Praha. — Laŭ deziro de ICK la administracio de la Progreso sendados al ĝi po 2 senpagaj ekz., anstataŭ la ĝisnuna 1 ekzemplero. — Kun G. E. L. estis interkonsentite interŝanĝi reciproke cirkulerojn de komuna intereso. — Kontraŭ la artikolo en Ligilo protestis krom Asocio, laŭ nia scio ankaŭ S-ro Friedrich en Košice kaj S-ro Scherer mem. — Nia prezidanto sendis al ni liston pri sia riĉa korespondado dum la lasta tempo. — Kiel konfidencaj estis deklaritaj du punktoj, temantaj pri propagando.

MOVADO EN ĈSR.

Dana registaro dankas al ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

La dana ministerio por eksterlandaj aferoj petis f-inon Noll, prezidanton de la Societo de danaj esperantistoj en Kopenhavn, ke ŝi transdonu al Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista kaj al ĉiuj, kiuj helpis al sukcesa iro de la dana esperanto-filmo tra Ĉeĥoslovakio, dankon de la dana registaro. Oficiala bulteno de la ministerio alportas detalan artikolon pri la ĉeĥoslovakaj prezentadoj de tiu filmo.

POLICISTOJ.

Kurso por policistoj en Praha komencita en novembro 1931 sukcese daŭras. S-ro dir. Růdek instruas en ĝi ĉiujajde 20 policistojn. — La Polica grupo kunvenas regule jaŭde. — Policistoj esperantistoj en Praha intencas fari ekzamenon por havi rajton porti esperanto - insignon en deĵoro.

RADIO.

Bratislava. Esperantlingva prelego de s-ro E. Wanitsek „El historio de slovaka popolo“ (3-a parto), 8. II. 1932.

Radio Košice. S-ro J. Scherer parolis 21. XI. 1931 esperantlingve pri „Vojaĝaj impresoj en en Ĉeĥoslovakio“. Tradukadis s-ro Friedrich:

Jsem již členem Svazu?

AL SAMIDEANOJ EN PRAHA!

Esperantista Klubo en Praha aranĝas sian jarkunvenon dimanĉe la 28. Februaro 1932 je la 8 horo matene en sia klubejo kafejo Louvre, Národní, 20.

En la nuna jaro la Klubo plenigas 30 jarojn de sia ekzisto. La ĉefaj festaranĝoj de tiu ĉi jubileo okazos nur aŭtune, sed jam la komenco de la nova administra jaro estu solena. Ĉiuj membroj estas invitataj ĉeesti.

Praha. La aŭtuna kurso por komencantoj aranĝata de Esp. Klubo havis 11 lernantojn en la komenco, kaj la saman nombron 11 p. en la fino. Tio estas atentinda fakto, kiu atestas, ke s-ro Staněk Frant., kiu gvidis la kurson, sciis trovi metodon, kiu konservis la intereson de la kursanoj ĝis la fino. 10 el tiuj kursanoj aliĝis al la klubo kaj vizitas kurson por progresintoj okazantan en la klubejo (kafejo Louvre, ĉiuvendrede de la 20—21. horo). Tiu kurso havas entute 15 vizitantojn. — La nova kurso por komencantoj, kun 18 p. okazas en lernejo „U Havla“, ĉiunmerkrede je la 19—21 horo. Instruas s-ro Staněk Fr.

Kunvenoj de E. Klubo okazas vendrede je la 20-a horo en aparta ĉambro de kafejo Louvre, (Národní). La 18. XII. S-ro Sustr parolis pri esp. libroj, prof. Novljan pri interna ideo. La debaton partoprenis Staněk Fr., Hromada k. a. — La 15. Jan. okazis 50-a membra kunveno. Prof. Novljan parolis pri esp-o kaj malgrandaj nacioj. Debatis Dr. Pumper, Staněk Fr., Weisskopf, Hromada, Sustr. — La 22. Jan. estis legita protesto de S-ro Scherer kontraŭ la ofenda artikolo en Ligilo. — La 5. Febr. prof. Novljan parolis pri retoriko. —

Praha. Kunveno de Verda Stelo por honorigo de dro Bischitzky okazis 19. XI. 1931.

Moravská Ostrava-Vítkovice. La parolado de S-ro Scherer en Instruista Pedagogio en Slezská Ostrava vekis grandan intereson por esperanto inter la partopreninta studentaro. Esperantista klubo uzis la okazon kaj aranĝis kurson. Ĝin vizitas 25 ĝelernantoj, gvidas S-ro Vladimír Slaný, prezidanto de la klubo. Estas espero, ke la aŭskultantoj fariĝos pioniroj de l' esperantismo. Ili, kiel estontaj instruistoj kaj edukistoj, povas por nia movado multon fari.

Košice. La ĝenerala kunveno de Esperantista Klubo okazis la 11. Januaro 1932. La klubo aranĝis en la j. 1931-a 2 hungarajn kursojn por komencantoj (gvidis D. Krémer) kaj 1 ĉefam (gvidis J. Friedrich). La ĉefa okazintaĵo estis 2 paroladoj de s-ano Scherer (1.300 ĉeestantoj). En la kluba biblioteko estas 80 libroj,

kasa stato 1.000 Kč. La nova komitato: Prez. Jos. Friedrich; vicprez. D. Krémer; sekr. R. Parkman; kas. A. Jeřmárová; bibl. Dro J. Fila; protokol. Fr. Nálevka. La klubo akiris novan klubejon en Legionársky Dom, Zbrojnická 10; kunvenoj lunde je la 19.30 horo. Nova kurso sub gvidado de D. Krémer komencis en januaro. Nombro de klubanoj: 23, ĉiuj organizitaj en ČAE aŭ GEL.

Zlaté Moravce. Publika kurso komencis la 10. Dec. 1931 por 10 komencantoj. Gvidas ĝiu S-ro Václav Felt.

Kežmarok. Publika kurso por komencantoj estis malfermita la 15-an de januaro 1932 kaj daŭros tri monatojn. Instruas f-ino Margit Feldmannová 24 partoprenantojn, inter ili gimnaziaj profesoroj, instruistoj, oficistoj, komercistoj, fervojistoj; tiuj ĉi pro intenco partopreni la internacian transportistan kongreson en Praha tian ĉi jaron.

Liberec. La klubo disdonis dum la propaganda semajno 2.000 germanlingvaj flugfoliojn. — Saksia-Bohemia amika kunveno okazis 18. VIII. 1931 en restoracio de la urbodomo; partoprenis 35 samideanoj.

Bor. La festaranĝo je memoro de la 25-jara ekzisto de la loka grupo estos la 5—6-an de marto 1932. Samtempe okazos ĝenerala kunveno de GEL.

Jáchymov. La loka grupo aranĝis 4-an de novembro 1931 germanlingvan prelegon pri Berlino kaj Havellando kun 100 lumbildoj; ĝi plendas pro malbona vizito.

Brno. Nova esp. kurso por komencantoj ekde 2. Febr. kun 45. p. Kurso estas senpaga, gvidas ĝin s-ino M. Strejčková, vicprez. de la klubo. Ĉe komenco de la kurso parolis s-ro Šamla, deklamis f-ino Baďurová, filineto de nia klubestro. La kurso estis anoncita en radio, ĵurnaloj kaj pere de flugfolioj. Pluaj interesoj ankoraŭ aliĝas.

Regiona ligo silezia

havis sian ĝeneralan kunvenon la 14. Febr. 1932 en Orlová, Hotelo Hvězda, je la 14. horo. Ĉeestis 47 p. el 15 lokoj. S-ro Kobiela salutis en la nomo de Macierz szkolna. Sekretario S-ro Hladký prezentis raporton pri agado, kasiso S-ro Skulina la raporton financan, laŭ kiu REL havas 500 Kč, bibliotekisto S-ro Petrak sendis raporton pri biblioteko, kiu havas 10 librojn. Laŭ novaj elektoj la komitato estas: Krysta prez., Poncza J. vicprez., J. Hladký; sekr., V. Slaný vicsekr., F. Skulina kas., E.

Chudoba vickas., F. Petrak bibl., E. Eisenberg anstataŭanto, K. Adámek kaj F. Křetínský revizoroj. — La kotizo estas 6 Kč plus 2 Kč aliĝpago. Subtenantoj 10 Kč. — Pri la agado de REL niaj membroj estis informataj en n-roj 8.—10.. Okazis 11 laborkunsidoj, el ili tri sur montoj Cantorio, Javorový kaj Stožek. — S-ro Křetínský sukcesis ligi kontakton kun radio-stacio en Ostrava. — La kotizoj enspezitaj estis uzitaj nur por administrado. — Al la multe laboranta sekretario S-ro Hladký helpis per multobligado S-ro Křetínský, konata jam al niaj legantoj pro lia energia agado, kiu ebligis tian sukceson de S-ro Scherer en Ostrava.

Diversaĵoj: Esperantista klubo en Vítkovice sendis gratulleteron al la ministro de Edukado en Hispanujo por valora helpo al nia movado. — Ligo akceptis garantian de Kč 50.— por fino Havlášková e Radvanice, kiu kunmetis kruconigmon en formo de kvinpinta stelo kaj volas doni same altan premion al solvinto. — S-ro Krysta atentigas pri la Va Tutrespublika Esperanto—kongreso en Olomouc. — Por ke ĉiu REL anoj pliperfektigadu en la lingvo, oni decidis, ke en ĉiu kunveno oni nacilingve diktos mallongajn artikolojn, kies tradukoj estos analizataj ĉiam en sekvanita kunsido. Por venonta kunveno prenos ĉiujn tri tekstojn s-ro instruisto Liberda el Třinec. — En venontaj kunvenoj estos pritraktata la ebleco fondi teatron rondeton kaj kompili negrandan kantareton enhavonta naciajn kantojn de ĉiuj tri lingvoj. — Estis akceptita la propono de s-ro Skulina, ke Ligo mendu 500 kovertojn kaj leterpapirojn kun firmao de

Regiona Ligo, kiujn povas aĉeti kaj uzi ĉiu RELano. — La dua propono de s-ro Skulina, ke Regiona Ligo fariĝu membrosubtenanto de UEA, estis dumtempe prokrastita por la jaro 1933. — Venonta kunveno de REL okazos la 6-an de marto 1932 je la 14^{1/2} en Český Těšín. — Post mallonga paŭzo sekretario s-ro Hladký laŭtlegis unu el siaj lastaj tradukoj kun titolo: „Krimulo“.

Al gesamideanoj de Ostrava-regiono.

La instituto de „Masarykova vyšší škola lidová“ en Mor. Ostrava senpage disponigis por niaj kunvenoj unu ĉambron en burĝa knabina lernejo en la strato Purkyňova en Mor. Ostrava. La subskribinto, kiu ĝin prizorgis, invitas ĉiujn gesamideanojn. La kunvenoj okazas ĉiusemajne merkrede kaj daŭros tri monatojn ĝis la 14-a de aprilo 1932. Ĉiu partoprenanto havos okazon pliperfektigi en nia lingvo kaj krom tio bone amuzi. Ĉiu helpu en ĉi tiu entrepreno kaj zorgu, ke en „Granda Ostrava“ estu ankaŭ granda nia movado. La partoprenantoj de ĉi tiuj kunvenoj ricevos 50%an rabaton je ĉiuj lokaj tramoj kaj ŝtataj fervojoj. Do eluzu ĉi tiun okazon kaj vizitu nin ĉiuserkrede.

„Masarykova vyšší škola“ ankaŭ aranĝas en tiu sama lernejo 3 monatan esperanto-kurson por komencantoj. Tiu ĉi kurso komencis vendrede la 22an januaron 1932 je la 19a kaj daŭros ĝis la 21a horo. La subskribinto, kiu gvidas ĝin, petas gesamideanojn varbi por tiu ĉi kurso ĉiujn interesantojn. En la nova jaro kun nova kuraĝo antaŭen! Frant. Křetínský.

Gazetara servo de Ĉ. A. E. al siaj amikoj!

Ĉio nun instigas daŭrigi kun ĝojo nian laboron; Granda intereso kaptanta ĉiam pli vastajn rondojn de kunlaborantoj kaj la atingita sukceso.

Sparante vortojn ni transiras al nelonga raporto pri la jaro 1931 de Gazetara servo.

Dum tiu jaro 5 cirkuleroj kun sume 48 artikoloj estis akspeditaj. Ni sendadis la cirkulerojn regule al 300-325 kunlaborantoj; krome al 13 ĵurnaloj en Praha ni liveras materialon ĉiusemajne.

71 (65) gazetoj en Praha	443 (240) artikolojn
66 (37) gazetoj en cetera Bohemio	336 (90) artikolojn
45 (38) gazetoj en Moravio-Silezio	286 (202) artikolojn
15 (7) gazetoj en Slovakio kaj Subkarpata Rusio	102 (28) artikolojn
8 (—) gazetoj ĉeĥoslovakaj ekster la respubliko	61 artikolojn
<u>205 (147) gazetoj kun</u>	<u>1228 (560) artikoloj</u>

Inter ili Třebíč kun 82 artik., Mladá Boleslav kun 61 artik. kaj Plzeň kun 54 artikoloj. Ili vivu kaj vivu la sekvontoj!

Konstato, kio estis represita, ne estis facila. En tiu grava kontrolado ni ne trovas sufiĉan subtenon de niaj amikoj. Tamen nun bonvolu memori pri ni legante en ĉeĥoslovaka gazeto ion ajn pri internacia lingvo kaj sendu al ni tiun gazeton. Ciferoj nun donataj estas laŭ artikoloj venintaj en niajn manojn.

Dum 1931 reprenis (inter krampoj estas ciferoj de 1930)

Ĉio estas dikega volumo okulplaĉe aranĝita. Rigardo en la kolekton certe vigligos la korbatojn de ĉiu samideano.

„Mil artikolojn en 1931!“ estis nia devizo por 1931 kaj ni plenumis la taskon. Dum nuna jaro ni deziras dediĉi apartan atenton al regionoj, kie ni ne atingis staton de ni deziratan. Dume ni daŭre kaj streĉe atentos la jam akiritajn poziciojn.

Memoru: 205 gazetoj ĉeĥoslovakaj sciis pri ni en 1931. Kiom da ili estos en 1932?

Dankon kaj antaŭen!

Ni volas vin speciale pefi, ke vi zorgu pri baldaŭa represo de la aktualaj artikoloj. Estas necese, ke plej frue ĉiuj gazetoj de la respubliko skribu pri V-a ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso en Olomouc kaj pri la XXIV-a en Parizo. Sendu al ni baldaŭ laŭeble en 2 ekz. represon de ripete al vi sendita artikolo pri Liechtenstein. Rekompence vi ricevos rekte el tiu lando poŝtkarton kun esperanta teksto, pri kiu parolas la artikolo.

Gen. sekr. de CAE O. Ginz.

OSL. GAZETARO KAJ ESPERANTO.

Novan bildon de S-ro Scherer ni trovis en *Letem světem* dum novembro.

Sbratření ripete atentigas pri nia lingvo. Per speciala alvoko enpresata en preskaŭ ĉiu numero ĝi rekomendas al siaj legantoj lerni esperanton. Krome oftaj aludoj en ĉi tiu pacifista revuo pruvas ĝian ŝaton al internacia lingvo. En decembra nro ni legas nekrologon pri samideano Tutsch kun mencio pri lia laboro por esperanto.

En *Kostnické jiskry* 10. XII. informas Stabor pri artikoloj en Heroldo de Esperanto parolantaj pri la pasintjara jubileo de ĉeĥaj protestantoj. Pri sama afero skribas *Český bratr* nro 1-1932-

Masarykův lid 11. XII. havas interesan rakonton de Frant. Mrkvička sub titolo: Sorĉa libreto. La libreto estis lernolibro de esperanto.

Národní politika 2. I. alportis longan artikolon pri turismo en Afriko kun du bildoj kaj noto, ke estas traduko de esperanta manuskripto liverita de J. Williamson, en Moshi.

Kiel estas festata Kristnasko kaj Novjaro de katolikoj en Hindio estas felietono en *Lidové listy* 25. XII. tradukita el esperanto de Lud. Dandová.

Skaut Bratislava havas en sia nro 5-1931 esperantlingvan alvokon al katolikaj skoltoj, ke ili kunlaboru en Skolta Esperantista Ligo.

Zájmy strojvůdce 1. XI. parolas pri neceso de IL por internacia kunlaboro en artikolo pri la abstinenco movado inter fervojistoj.

Propoj de Internacia Laboroficejo kontraŭ

senlaboreco, tradukitaj el esperanto de Fr. Pytloun aperis 22. XII. en *Pokyny pro obvod Štorchův*.

Magyar tanügy Bratislava ofte alportas rubrikon pri esperanto kaj raportojn pri la progresado de nia lingvo.

Pedagogia revuo por duagrada lernejaroj eldonata de C. societo de ĉsl. profesoroj *Střední škola* (Meza lernejo) eldonis *Index* on por siaj unuaj 10 jarkolektoj (1921-1930). Ni tradukas la titolon Esperanto kun indiko de jarkolektoj kaj pago: Esperanto II. 76. II. 222, VIII. 107; — ĝia instruado en ĉsl. lernejoj IV. 141, VI. 242; — ĝia instruado en mezaj lernejoj V. 179; — ĝia signifo IV. 28; — en mezaj lernejoj germanlingvaj en ĈSR IX. 256; — Ligo de nacioj pri ĝi IV. 41; — malpermeso instrui ĝin en Francio III. 179; — ekzameno pri ĝi IV. 142. — Estas vidate el tiu ĉi nomaro, ke grava pedagogia revuo daŭre informas siajn fakulajn legantojn pri esp-o kaj ĝia rilato al pedagogio en duagradaj lernejoj.

Pri esperanta letero el Pardubice al Senarmiga konferenco ĝeneva raportas *Večerní České Slovo* 27. I.

Národní listy 15. I. alportas sciigon pri ŝtata filmo japana kun esperantaj titoloj.

Státní zkoušky z esperanta pro vyučování esperanta na školách obecných a měšťanských konaji se v polovici dubna a listopadu při státní zkušební komisi učitelského ústavu v Praze II. Panská ul. 3. (Informace o zkouškách, žádostech, dokladech, taxách a j. viz v „Poučení o učitelských zkouškách“ od Dra Majera.) Přihlášky měsíc předem. Žádost kolkuje se 5 Kč. Doklady: Curriculum vitae se seznamem spisů, z nichž se kandidát připravoval, křestní list, poslední vysvědčení školské, vysvědčení z chování, vysv. lékařské. Poplatky (splatné po zkoušce): 50 Kč zkušební taxa, 8 Kč kolek na vysvědčení, 4 Kč tiskopisy. Absolventům gymnasií, reálků a obchodních akademií odpouští se zkouška z češtiny, učitelům a profesorům mimo to též z pedagogiky a školských zákonů. Ostatní kandidáti konají zkoušku z češtiny (české mluvnice), pedagogiky, školských zákonů a esperanta. Prameny: Kterákoli mluvnice češtiny, „Obecná pedagogika a didaktika“ od Svadlenky, „Sbírka školských zákonů a nařízení“ od Buzka. Z esperanta koná se zkouška písemní na stanovené thema dopoledne, odp. pak ústní. Žádá se: 1. Znalost fundamentálního slovníku Dra Zamenhova (v Klíči Č. E. Institutu), 2. esp. mluvnice podrobně. 3. výklad zajímavých tvarů a obrátů esper. na základě překladů z češtiny do esp. a opačně. 4. Nejdůležitější díla esperantské literatury původní a přeložené, životopis Zamenhofův, organisace esper. hnutí domácí a světová. (Pomůcka: „Rádce českého esperantisty“ od Šupichové a „Vivo de Zamenhof“ od Dra Privata, (Zkoušky v Praze mohou skládati i kandidáti z Moravy.) Dr. A. Pítlik

Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA - Presis JAN MINÁŘ NYMBURK.